# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo decembro 2012**


## KONFERENCO DUM LA ZAMENHOF-TAGO

La venontan 15-an de decembro, Madrida Esperanto-Liceo celebros konferencon por festi la Tagon de Esperanto (aŭ *Zamenhof-Tagon*) kaj samtempe la 125-an datrevenon de la naskiĝo de la lingvo, por la venonta 15-a de decembro. Ĝia titolo estos **"La valoro de Esperanto kiel interkultura fenomeno"** ("*El valor del esperanto como fenómeno intercultural*")




La konferenco okazos en la Centro Cultural Galileo, en la strato Galileo, numero 39, kaj ĝi estos malferma por la ĝenerala publiko. Dum la mateno la plejmulto el la prelegoj disvolviĝos en la hispana kaj temos pri diversaj aspektoj de la internacia lingvo. Vespere, oni celos esperant-lingvan publikon, kun ĝeneraltemaj prezentadoj.

La **programo** estas sekva:

10:30 Presente y perspectivas del esperanto a los 125 años de su aparición, José A. del Barrio.

11:30 La biblioteca digital de la Federación Española de Esperanto, Ana Manero.

13:00 El uso del esperanto en la vida familiar, Pedro Hernández Úbeda.

16:00 (en Esperanto) Komunikado kun ekster-teranoj, Manuel Pancorbo.

17:00 (en Esperanto) Historio de la Ibera Duon-insulo dum la islamana regado, Ricardo Albert.

18:00 (dulingve) Legado de poemoj (Lectura de poemas), Jorge Camacho.

19:00 Projekciado de la dokumenta filmo "The universal language", en la angla kaj Esperanto kun hispanaj subtekstoj, kaj posta kolokvo.

Por la tagmezo, MEL organizis komunan bankedon en proksima restoracio. Telefonu al la sidejo aŭ skribu al madrid@esperanto.es por rezervi la manĝon kaj selekti la menuon. Aŭ atentu la forumon http://esperanto.creatuforo.com/ kie ni aldonos pliajn detalojn.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

Memoru ke oni plu pretigas la renkontiĝojn okazontajn venontjare en Madrido kaj proksimaj urboj.

La **Iberia Renkontiĝo** organizata de Hispana Esperantista Junulara Societo disvolviĝos en Madrido dum la semajnfino de la 15a ĝis la 17a de marto 2013. Por informoj skribu al la reta adreso: IRoMadrido2013@gmail.com.

Fine de julio 2013 okazos en Madrido internacia **SAT-kongreso**. Vidu detalajn informojn ĉe http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html. Jam aliĝis partoprenontoj el, interalie, Madagaskaro, Aŭstralio kaj Usono.

La unuaj informoj pri la **Hispana Esperanto-Kongreso**, kiu disvolviĝos en Zaragozo inter la 3-a kaj la 5-a de majo aperas en la retejo de la zaragoza grupo "Frateco", kaj ankaŭ en tiu de HEF: http://www.esperanto.es/kongreso.

**nia voĉo** **decembro 2012**

## EKSPOZICIO DE LA CGT




Kiel ni anoncis en nia pasinta numero, grupo de Esperanto-parolantoj kaj -simpatiantoj de la liberecana sindikato CGT (Ĝenerala Konfederacio de Laboro) organizis en novembro serion de konferencoj en Burgoso, kun titolo "La lingvo kiel liberigilo: Esperanto". La prelegoj disvolviĝis kun rimarkinda sukceso, kaj vekis intereson de la publiko ĉeestanta.

La sama grupo pretigis ekspozicion pri Esperanto, konsistantan el 21 paneloj kiuj montras ampleksan kaj detalan panoramon pri Esperanto, ĝiaj ecoj, ĝia historia rilato kun la monda laborista movado, kaj ĝia nuntempo. Ĝi estis vizitebla dum la tuta semajno en la sidejo de la sindikato, kaj dum venontaj monatoj tre verŝajne ĝi vojaĝos al aliaj urboj de Hispanio.

## VIZITAS NI

Pedro Hernández vojaĝis fine de novembro al Ruando, kie li pasigos venontajn semajnojn. Tial, la kursoj por komencantoj momente interrompiĝis, sed rekomenciĝos post lia reveno.

## ALIĜO AL HEF KAJ MEL

Hispana Esperanto-Federacio eldonis flugfolion por klarigi la kialojn por aliĝi al esperantista asocio, por antaŭenigi la informadon kaj varbadon por nia lingvo, kaj por kuraĝigi la aliĝon por la jaro 2013. Ĝi estas trovebla en nia sidejo, kaj ankaŭ legeblas en la retpaĝo http://www.esperanto.es/hef/index.php/nia-asocio/kialalighi

Alia dokumento celas informi kiel kunlabori kun la asocio, ĉu oni estas membro aŭ ne: http://www.esperanto.es/hef/index.php/nia-asocio/kielkunlabori

Iamaniere ĝi taŭgas por informi kial meritas la penon esti ano de Madrida Esperanto-Liceo. Nun, kiam finiĝas la jaro, pripensu, se vi ankoraŭ ne membras, ke aniĝo kaj kunlaboro en asocioj estas gravaj por la estonto de nia lingvo.

## NIA QR

Kiel facile aliri al la retpaĝo de Madrida Esperanto-Liceo? Se vi posedas inteligentan telefonon aŭ tabulkomputilon, utiligu vian QR-legilon kaj celu la apudan simbolon. Tiel simple!

## VENONTAJ RENKONTOJ

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º. Babilrondoj plu okazas la unuajn sabatojn de ĉiu monato en centrurba kafejo.

Novaĵoj kaj detaloj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, en retejo http://www.esperanto.es/mel aŭ en forumo http://esperanto.creatuforo.com/

madrida esperanto-liceo

San Alejandro 6-4ºB-ext. 28005 Madrid (nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7, Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrido@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com